Johann Wolfgang von Goethe,

# Gefunden

Ich ging im Walde
So für mich hin,
Und nichts zu suchen,
Das war mein Sinn.

Im Schatten sah ich
Ein Blümchen stehn,
Wie Sterne leuchtend,
Wie Äuglein schön.

Ich wollt' es brechen,
Da sagt' es fein:
„Soll ich zum Welken
Gebrochen sein?"

Ich grub's mit allen
Den Würzlein aus,
Zum Garten trug ich's,
Am hübschen Haus.

Und pflanzt' es wieder
Am stillen Ort;
Nun zweigt es immer
Und blüht so fort.

. . .

Johann Wolfgang von Goethe,

# Trovita

*tradukita de Antoni Grabowski*

Mi foje arbaron
Promene eniris,
Kaj serĉi nenion
En penso deziris.

Mi vidis, en ombro
Jen staras floreto:
Steleto lumanta
Aŭ blu-okuleto.

Mi volis ĝin ŝiri,
Sed plore ĝi diras:
"Ĉu por ke mi velku,
Vi tial min ŝiras?"

Do mi ĝin elfosis
Kun radikareto,
Kaj portis al mia
Ĝarden' ĉe l' dometo.

En loko trankvila
Plantite karese,
Ĝi kreskas, burĝonas,
Kaj floras senĉese.

. . .

Johann Wolfgang von Goethe,

# Trovaĵo

*tradukita de Richard Schulz*

Mi vagis sola
En la arbar'.
Nenion serĉi
Jen mia far'.

Enombre vidis
Floreton mi.
Lumanta stelo,
Okulvizi'.

Al mi plukonta
Jen ĝia vort':
„Ĉu ke mi velku
Al frua mort' ?"

Mi ĝin elfosis
Kun la radik'
Ĝin portis domen
Al la larik'.

Replantis tie
Ĝin en la fru'.
Ĝi nun kreskadas
Kaj floras plu.

. . .

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* JOHANN WOLFGANG VON GOETHE *(∗1749-08-28 – †1832-03-22).*

*Arg-376-738 (2006-12-11 22:11:49)*

*Traduko de la Germana poemo "Gefunden" de* JOHANN WOLFGANG VON GOETHE *(∗1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de* ANTONI GRABOWSKI *(∗1857-06-11 – †1921-07-04).*

*Arg-376-741 (2006-12-14 00:07:48)*

*Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi traduk-version en la interreto, en la retejo de s-ano Don Harlow, en* `http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/Poezio/parnaso/`*, precize sub* `http://donh.best.vwh.net/Esperanto/iteraturo/Poezio/parnaso/trovita.html`*.*

*Traduko de la Germana poemo "Gefunden" de* JOHANN WOLFGANG VON GOETHE *(∗1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de* RICHARD SCHULZ *(Rikardo Ŝulco, ∗1906-07-12 – †1997-09-26) en 1984-07.*

*Arg-376-740 (2013-02-26 15:17:50)*

*Tiu ĉi poem-esperantigo aperis en la n-ro 61 (1984/7) de la Vestfaliaj Flugfolioj", kiujn eldonis Richard Schulz, kiu loĝis tiutempo en la germana urbo Mindeno (Minden). Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon* `http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz`*.*